

Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Jokohama Esperanto-Rondo (JER, Hama-Rondo)

NIAJ PLANOJ

☛ ĈE LA REGULA KUNVENEJO

En Kanagaŭa-Kenmin Sentaa (= Centro por la gubernianoj de Kanagawa), ĉirkaŭ la Stacidomo Yokohama, okazas jenaj klasoj.

* Regulaj Klasoj en sabato: Klaso por legado de "Tra dezerto kaj praarbaro", Klaso por legado de "Vivo de Lanti" / Jokohama Salono.

* Regula Klaso en merkredo.

RUDIMENTA KURSO DENOVE

Ni planas havi Rudimentan Kurson de okt. 27 ĝis jan. 26, en la supra loko. Kotizo estas 6000 enoj por la tuto, kun "Hanako lernas Esperanton" kiel lernolibro.

☛ EKSTER LA REGULA KUNVENEJO

KORUSA GRUPO POR LA KONGRESO

Korusa Grupo havas ekzercon 2 fojojn en monato en aparta ĉambro taŭga por kantado. La ekzercado daŭris eĉ dum aŭgusto, prepare al kantado en la oktobra 99a Japana Esperanto-Kongreso en Sapporo. Tie, krom la kutimaj "La Espero" kaj "La Tagiĝo" gvide kantotaj al la kongresanoj, la grupo prezentos sian specialan repertuaron, "Kanto de Abel-infanar'!".

INTERNACIA FESTO EN AŬTUNO

En la 20a kaj 21a de oktobro, ni partoprenos ekspozicion, kadre de la "Jokohama Aŭtuna Internacia Festo 2012", en la parko "Zoo-no-hana", apud la haveno de Jokohamo. Semajnon poste, nia rondo organizos Rudimentan Kurson, kaj ni esperas, ke la festo estos bona informejo pri la kurso.

TIEL OKAZIS

NEPALANO VIZITIS NIN

S-ro Bharat Kumar GHIMIRE el Katmando, Nepalo, gastis ĉe s-ro TANIGAWA Hiroshi en la 7a kaj 8a de julio, kaj vizitis nian lernokunsidon en la 7a, ekskursis en la 8a.

*julio 7 (sab) 15h00-16h50 en la lernoĉambroj

Li rondiris klasojn de la Rudimenta Kurso, kursoj por legado, kaj Salono, kaj interparolis kun la klasanoj.

*julio 8 (dim)

Li kun 4 rondanoj vizitis la japaneskan parkon Sankei-en.

CELEBRIS FINON DE LA KURSO

*julio 21 (sab) 17h00-17h30 ĉambro 705

La Rudimenta Kurso finiĝis kun unu lernanto. Post diplom-dono, regulaj ĉeestantoj celebris lin, kaj ĉiu parolis pri sia sperto pri Esperanto-lernado. Partoprenis entute 16 personoj.

EN LA HANOJA UK

*julio 28 - aŭg. 4, Hanojo (Vjetnamio)

En la 97a Universala Kongreso de Esperanto (UK) en Hanojo partoprenis pluraj rondanoj. Inter ili, jenaj personoj havis rolon en la kongreso: S-ro SUZUKI Keiichiro salutis nome de Japanio en la Inaŭguro, estante la prezidanto de Japana Esperanto-Instituto. S-ro SIBAYAMA Zyun'iti kaj s-ro INUMARU Fumio partoprenis la diskuton de UEA-komitatanaro. S-ino DOI Ĉieko laboris kiel stabano de la kongresa kuriero nomata "Loa!.. Loa!.. Loa!..", kaj s-ro DOI Hirokaz kiel kongresa fotisto --- kaj ili du estis alvokitaj en la Fermo, kiel eksterlandaj helpantoj al la UK, kaj estis dankataj.

■ Eldonas Doi Hirokaz ■ Redaktas la organa fako de JER: Sibayama Zyun'iti
 ■ Poŝtadreso: n-ro 85 CPO, Yokohama, Japanio (JP-220-8691) ■ Telekopio: +81-45-785-5458
 ■ Retadreso: hamarondo@yahoo.co.jp ■ TTT-ejo: <http://www.hamarondo.org>
 ■ Abono: jare 1500 enoj, aŭ 10 eŭroj ■ uea-konto: jokr-j (Jokohama Esperanto-Rondo)

ESE03

El la prelego de ges-roj Rarusson Hannes

MURATA Kazuyo

Ges-roj Rarusson Hannes (svedlingva finno) vizitis Japanion dum 2 semajnoj en aprilo 2012, kaj prelegis pri Francio en diversaj kunsidoj de esperantistoj. S-ro Hannes jam venis Japanion multfoje, aŭ por sia laboro aŭ por ski-kurado en Ho'kajdo.

Li estas finna inĝeniero loĝanta en Francio dum multaj jaroj, kaj lia edzino estas franco (ambaŭ estas e-istoj). Ili havas tri gefilojn kaj ses genepojn.

Lia laborfako (antaŭ dudek jaroj) estis kampo "rezisteco de materialoj kaj strukturoj de satelitoj kaj raketoj" kaj dua kampo estis "nukleaj reaktoroj de atomcentralo".

Li unue prezentis pri Eŭropa Unio, kaj poste pri Francio. La Metropolo de Francio (kontraŭ kolonio oni tiel nomas la ĉefteritorion) estas ses-angulo; tiu klarigo estis freŝa por mi, ĉar mi ne sciis, ke ankoraŭ nun ekzistas multaj kolonioj ekster la eŭropa kontinento. Ili loĝas 100km sude de Lyono [liono], proksime troviĝas atomcentralo (30 km).

Lia edzino estas membro de Verda Grupo, kiu kontraŭas atom-energion. Same kiel en Japanio la granda amaskomunikilo ne informas pri la movado. Kvankam en la 11a de majo ili faris la Homan Ĉenon ĉirkaŭ la atomcentralo, neniu informo aperis sur grandaj ĵurnaloj. Aŭdinte tion, mi sentis koleron kontraŭ socia politiko de ambaŭ landoj. Ĉar ankaŭ ni faris Homĉenon eĉ duoblan (onidire tio estis la unua skalo) en la

sama tago ĉirkaŭ la parlamentejo, memore al la granda akcidento de atomcentralo en Hukuŝima. Sed tute ne aperis pri tiu afero sur la ĵurnaloj.

En la prelego ankaŭ estis parolo pri demografio: scienco pri la nombro de naskiĝo.

Lastatempe en Francio furoras nova formo de geedziĝo, nomata PACS; ĝi laŭleĝe komenciĝis ekde la jaro 1999. Ordinare francoj edziĝas laŭ religia kutimo, kaj eksedziĝo estas tre malfacila. Sed laŭ PACS, oni povas facile pariĝi. Ne necesas esti francoj, eĉ japanoj se ili loĝas en Francio, povas fariĝi PACS-paro, kaj ili povas ricevi privilegion same kiel kutima edziĝo. Dume ili povas facile nuligi la rilaton.

Tiel, la duono de la edziĝoj finiĝas per divorco. Ekzemple en 2008, la nombro de ordinaraj edziĝoj estis 273 500, kaj inter ili samjare okazis 13 000 divorcoj, nome, duono de la geedziĝoj. Dume la nombro de PACS-iĝo estis 146 000. Inter ili 25 000 PACS-uloj nuligis la rilaton, dume 10 000 volis denove PACS-iĝi. Tial nur 15 000 da nuligo. Tio signifas ke ĉirkaŭ 10% estis nuligitaj. Do la PACS-sistemo estas en sufiĉe bona stato.

Dume el la nombro de naskitoj, duono estis el gepatroj per PACS. Danke al tiu sistemo, en Francio la virina fekundeco estas alta, ĉ. 2; en Japanio tiu estas 1.03.

(Noto de la redakcio: PACS = Pacte Civil de Solidarité, t.e. Pakto Civila pri Solidareco)

JAPANISME POR LA RUSOJ (1)

notita de Anatolo Gonĉarov

Antaŭparole

Ekleginte la unuan japanan esperanto-libron mi baldaŭ komprenis, ke el ĉiuj etnoj kontaktitaj pere de Esperanto, la japanoj estas la plej malsama ol la rusoj en pensmaniero. Pro tio mi notis ĉion kion mi dirus alimaniere per la (rus-)esperanta

gramatiko. Ekz. (pli sube vi trovos tiun citaĵon kun la referenco) la japanoj diras: *Montvilaĝo jam estis preta kontraŭ la alvenonta vintro*. Sed ni, la rusoj dirus: ... *estis preta por (al) la alvenonta vintro*. Kaj neniam ni uzus la vorton *kontraŭ*. La tradukisto de la citaĵo estas tro renoma esp-



isto por temi pri lingva eraro. Simple la japanoj tiel perceptas la mondon, por ili la vintro estas pligranda plago ol por la rusoj plikutimaj al frostoj. Tial uziĝas preskaŭ batala termino *kontraŭ*.

Vi trovos ĉi tie plurajn aliajn similajn rus-japanajn malkoincidojn. La malkoincidoj, tamen, estas klare kompreneblaj, nur portantaj alian freŝeplaĉan mens-manieron.

Intertempe mi diru, ke en mia sufiĉe granda esperanto-biblioteko mi tralegis nur kvaronon da libroj, sed absolute ĉiujn japan-aŭtorajn.

La materialo aperos preskaŭ samtempe ankaŭ en la rusia esperanto-revuo "Rego", ero en la artikolserio *Naciaj diraĵoj esperanto-veste*.

Mi esperas ke la legantoj trovos per tiuj citaĵoj kondensiĝon da vere japana pensmaniero kaj riĉigas la mondpercepton de la rusaj (ankaŭ slavlingvaj kaj alilingvaj) esperanto-legantoj. Ke tiu riĉeco de la japana (kaj ajnlingva) mondpercepto grandparte perdiĝas ĉe nacilingva tradukado, estas konata fenomeno.

Kiam li elkovis sian planon ĝis tio, li unuafoje sentis ke li **venis sub la lumon**.

Miyamoto Masao, tr., Belarto, 1961, aŭtuno, p. 43.

Kisuke suferis serĉante vivrimedon en la socio. Kaj se li nur ĝin trovis, li laboregis sen penevito kaj kontentiĝis jam per tio, ke li apenaŭ povis "**ameli al si la buŝon**".

Teruo Mikami, tr., Mori Oogai, Rakontoj de Oogai, Japana E-Instituto, Tokio, 1962, p.10.

Saburo rigardadis kompare la du vizaĝojn kaj **tenis silenton** dum kelka tempo....

Teruo Mikami, tr., Mori Oogai, Rakontoj de Oogai, Japana E-Instituto, Tokio, 1962, p.31.

Mi sentis solecon, **kvazaŭ mi estus ensorbata en la ĉielon**

Teruo Mikami, tr., Mori Oogai, Rakontoj de Oogai, Japana E-Instituto, Tokio, 1962, p.154.

Kiam Simio kun granda ĝojo surgrimpis arbon kun la muŝiro por ĝui panoramon de sur ĝi, tuj ekglitis kaj "**eĉ Simio falis de sur la arbo**", kiel ja diras la proverbo. [*La rusoj samsence diras eĉ la ĉevalo, kvarpieda stumblas*, rim. de A.G.]

Tr., Japanaj malnovaj rakontoj, Eld. Amo-Akademio, Japanio, 1965, p.8. (*daŭrigota*)

BELETRO

Urso (熊)

verkis KUME Masao
esperantigis AIDA Kiyoshi

Iun tagon mia amiko naskiĝinta en Hokaidoo rakontis pri urso por miaj najbaraj knaboj.

Ĉapitro 1

Urso estas certe terura rabobesto, sed ĝi ne mortigas homon pro sia propra deziro. Flanke de urso ĝi timas homon samkiel homo timas urson. Kiam ĝi trovas, ke homo venos ĉi tien, la urso antaŭ ĉio forkuros. Sed se la ambaŭflankoj neatendite renkontas aŭ renkontas ĉe la vojo neevitebla, la urso despere atakos homon. Do, sur la surmonta vojeto en Hokaidoo, oni marŝas uzante trumpeton, kiun toufuiŝto aŭ ĉaristo uzas, por sciigi al urso ke homo estas proksimiĝanta. Estas impreso, ke poŝtisto kun pistolo sur la kokso trumpetante kuras sur la intermonta vojo en la

nebula krepusko.

Iun tagon mi aŭdis de unu kolportisto la jenan rakonton. La kolportisto ne povis marŝi antaŭen pro vesperiĝo ĉe iu altebenaĵo de Tokaĉi. Li laciĝis ĉe piedoj kaj malsatiĝis. Kaj li ankoraŭ piediris per pezaj paŝoj serĉante domon. Intertempe li venis al maiza kampo. Li vidis ion nigran moviĝantan en la kampo. Li ne povis klare distingi ĝin, ĉar tie kreskis maizoj pli altaj ol homoj. Li supozis, ke neniuj alia povus resti tie escepte de homo en tiu horo.

Trankviliĝinte li senkonscie alproksimiĝis al tiu supozata homo por demandi ĉu troviĝas domo proksime. Li fiksrigardis ion nigran nur malpli 10 metrojn for de li kaj trovis la objekton "La patro" kiel oni diras por urso en Hokaidoo. La

kolportisto surprizite ŝtoniĝis. Samtempe la urso nur nun rimarkis lin kaj akre kontraŭrigardis ĉi-flanken haltante la lekadon per ruĝeta lango. Alfronte la urson li ne povis foriri aŭ eviti la danĝeron. Li momente paliĝis.

Ĝuste tiam li ekhavis bonegan ideon kiel la revelacion de la Dio. En la malespera situacio hazarde venas la neatendita ideo al homo. Li abrupte malfaldis la ombrelon antaŭ sia korpo. Kaj poste li faldis ĝin. Li ripetis la movojn kaj senhezite alproksimiĝis al la urso kaŝante sian korpon post la ombrelo alterne malfaldante kaj faldante la ombrelon. Kaj li malrapide alproksimiĝis al la urso malgraŭ la timo, ke la urso atakos lin. Li alproksimiĝis al la urso 9 metrojn for de li. Kaj plie li proksimiĝis al la urso, sed ĝi ne atakis lin. Denove li faldis la ombrelon, sed la urso tiam forkuris kaj estis nenie trovebla. Li senkonscie forgesis danĝeron tiam kaj ridetis. Kiel la urso vidis ripetadon de faldo kaj malfaldo de la ombrelo? Ĉu la ombrelo estis vidata de la urso kiel monstro?



Ĉapitro 2

Mi rakontos pri la lukto inter urso kaj virbovo, kiun mi aŭdis de la viro de paŝtejo. En Hokaidoo bredado estas tre populara kaj oni bredadas fortajn virbovojn en preskaŭ ĉiuj paŝtejoj. Tiuj ĉi virbovoj venkas ursojn en la lukto. Estis unu el bravaj luktoj, kiun iu paŝtisto vidis.

Iun vesperon iu virbovo, kiu ĉiam estis paŝtita, ne venis hejmen. La paŝtisto serĉis ĝin en ĉiuj anguloj de la paŝtejo. Li trovis, ke la virbovo fiksrigardis kontraŭ unu urso en la ombro de kelkaj altaj arboj. Surprizite li volis forkuri. Sed li ne povis kuri pro ŝtoniĝo de siaj kruroj. Li timeme vidis la lukton inter la bovo kaj la urso sub la ŝirmo de la apuda arbo, ĉar li estis altirita pro ekscita sceno. Dume la urso kaj la bovo ne rimarkis la estadon de la homo.

La urso kaj la bovo daŭre fiksrigardis unu la alian longan tempon. Dume la virbovo fosis truon per postaj kruroj por starejo. Poste ĝi sidiĝis fleksante la genuojn kaj atendis ke la urso mem alproksimiĝos. La urso de sia flanko ne povis ataki la bovon. Ĝi nur rigardadis la bovon profitante ŝancon.

En la kazo de la virbovo, ĝi restis senmova

preparinte la batalon kontraŭ la urso. La bovo fiksrigardis la urson de supre de la malalta loko malfermante sangoplenajn okulojn. Dume la urso decidis la solvon pozitive kaj ŝovis sin antaŭen iom post iom al la bovo ekmovante la nigran kaj pezan korpon.

Ili alfrontis unu kontraŭ la alia malpli ol unu metron dise. Sed la urso ankoraŭ ne atakis. Ankaŭ la bovo silentis. Ili ankoraŭ restis unu kontraŭ la alia ĉirkaŭ kvin minutojn. Ili aspektis tutfortaj batalantoj, sed kvietaj kiel arboj. Baldaŭ la urso kuraĝe ekstaris per postaj piedoj kaj metis la dekstran manon sur la maldekstran kornon de la virbovo. Sed la bovo ankoraŭ ne moviĝis. Iom poste la urso ĉifoje metis la maldekstran manon sur la dekstran kornon de la bovo. Tuj poste la bovo tutforte puŝis la ventron de la urso koncentrate sian forton al la korno. La urso, kiu estis neatendite atakita, ne havis la tempon eviti la atakon de la korno. Finfine la bovo venkis sian rivalon en la batalo. La urso, kiu estis batita per korno, baraktis por disŝiri la bovon. Sed la urso estis puŝita ĝis la trunko de la granda arbo ĉirkaŭ 8 metrojn for de la unua loko de ilia renkonto. La bovo fortege puŝis la korpon de la urso per la kornoj al la trunko. Kvankam ili restis senmovaj, la paŝtisto timeme aliris al la sceno. Li trovis, ke la bovo, kiu puŝis la disŝiritan urson al la trunko, jam mortis. Eĉ brava virbovo eble mortis post la konstato, ke la urso jam estis mortinta, ĉar ĝi konsumis sian tutan forton en la batalo. La paŝtisto neniam antaŭe en sia vivo vidis tian teruran batalon. *(fino)*

Pri la aŭtoro

Kume Masao (久米正雄) (1891 ~ 1952), naskiĝinta en la urbo Ueda, la gubernio Nagano, studadis sub la gvido de Nacume Sooseki kaj diplomiĝis el Universitato Tokio. La famaj verkistoj Akutagŭa Rjunoske kaj Kikuĉi Kan estis samklasanoj de Kume Masao. Li partoprenis en la literatura grupo, kiu eldonis la gazeton nomatan “Ŝinŝiĉjoo (nova literatura ideo)”. Poste li ŝanĝis sian literaturan stilon al tiu de populara romano. Li verkis la dramon “Fratoj de laktisto” kaj la novelon “(Ŝipruiniĝo)”. Li ankaŭ versis hajkojn kaj tiam nomis sin “Santei”.